

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa
(Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonoj).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Bullin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando,
Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70865,
por Teo Jung, Köln-Horrem

Manuskriptojn oni skribu nur
sur unu flanko de la papero.
Skribu ĉion legeble, se eble
per maŝino. Por resendo aŭ
respondo aldonu resp.-kup.,
aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al
s-o Teo Jung, Köln-Horrem,
Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemple akceptebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazeto-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrato per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritataj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Numero 66 :-: Edinburg, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 8. Jan. 1922.

Preparu vin!
(Admono ĉefe al gvidantaj Esperantistoj en ĉiuj landoj.)
Ĉiuj propagandantoj de nia lingvo ja scias, ke la sekretario de la Ligo de Nacioj baldaŭ devos doni raporton al la Ligo pri la efektiva disvastiĝo kaj ĝisnuna instruado de Esperanto. Tiu raporto estos la bazo de la diskutoj pri nia afero en la kunveno de la Ligo en 1922, kaj de ĝia kompleteco dependos nia sukceso. Estas do sendube, ke, se ni volas la sukceson, ni Esperantistoj devas mem zorgi, ke la sekretario de la Ligo ricevu ampleksan kaj precizan materialon por la raporto. La sekretario ja ne povas trasti la tutan Esperantan gazetaron por eltiri la necesajn informojn el ĝiaj kronikoj — tio devas esti klara.


Cu vi do jam atentis la vortojn de s-o Privat en la nombra numero de „Esperanto“ (Esperanto en Lernejoj, p. 185)?
„La enketo de la Ligo de Nacioj informos la registarojn pri jam komencitaj provoj, pri disvastiĝo de la lingvo, pri amplekso de preta literaturo, pri ekzisto de eblaj instruantoj. Niaj naciaj societoj bonvolu jam nun prepari akuratan respondaron al tiuj demandoj.“
Sed ĉu vi do ankaŭ faris iajn paŝojn por „prepari la respondaron“? Mi timas, ke nur en malmultaj landoj oni jam entreprenis ion por havigi al la Ligo de Nacioj la necesajn informojn, kaj tial mi volas admoni la gvidantajn propagandistojn en ĉiuj landoj kaj precipe la estrarojn de la naciaj Esperantistaj asocioj senprokraste prizorgi la plenumon de la tasko.
Kiel oni povas ĝin plenumi, mi volas montri per konkreta ekzemplo de la Esp. Asocio de Finnlando.
Konvinkita per propra sperto, ke ĉe propagando en la oficialaj rondoj antaŭ ĉio estas necesaj faktoj (eĉ malpli gravaj sed precizaj konkretaj faktoj, kaj ne mallikaraj ĝeneralaj asertoj), la estraro de EAF per obstinaj petoj pri enkonduko de Esperanto en lernejojn instigis la ŝtatan postuli de ni plenajn informojn pri la nuna stato de Esp. instruado en nia lando. Per tio la unua paŝo estis farita.
Kiam nun el Genevo venis scilgo pri farota enketo de la Ligo de Nacioj, la Asocio uzis la okazon kaj presigis jenan demandaron:

Aperas semajne.
3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 560 hung. kronoj, 1200 austr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu 100 germ. mk., Rusio 50 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonitu ĉe la poŝto (Postzeitungsaliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvoroniare 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrato Köln-Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2.— mk.).

JARABONO:
Aperas semajne.
kostas po cm² (kvadracenta metro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCETOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezo de 4 n-oj de ET (1/2 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezo de 6 n-oj de ET (1/2 jar-abono); 1 foja enpresoj kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, flandigo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉekunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Bildoj el Suda Svislando.

La regiono de eterna printempo.



Aleo de palmoj en sudsvisa urbeto.



Rivapiana. Preĝejo S-ta Kviriko. Locarno. Ĝibridone (2191 m).

Rilatas al la skribaĵo n-o 1130 de Eklezia kaj Instrua Ministerio. (Traduko.)
La instruado de Esperanto en Finnlando.
(Enketo.)

Ĉar en la Ligo de Nacioj estas levita la demando pri la internacia lingvo Esperanto, kaj ĉar la sekretario de la Ligo estas postulo de la ŝtatoj apartenantaj al la Ligo detalajn informojn pri la nuna pozicio de la internacia lingvo kaj pri ĝiaj ĝisnuna sukceso, la Ministerio de Eklezio kaj Instruado sin turnis al ni per skribaĵo n-o 1130 kiu petas havigi al la Ministerio la nomitajn informojn. Sekve de tio ni petas, ke vi kiel eble plej baldaŭ bonvolu sendi al ni la ĉi-supre demanditajn sciligojn, eĉ en okazo, ke via respondo devus esti negatifa.

1. Ĉu en via loko (en lernejo, seminario, daŭrigaj kursoj, popola altlernejo, laborista aŭ civitana instituto, specialaj kursoj) estis instruata Esperanto?
2. Kiel okazis la instruado? Kiel longe (nombro da semestroj kaj horoj)? En kiuj klasoj? Kiun aĝon havis la lernantoj?
3. Nombro de lernantoj en komenco kaj fino de ĉiu kurso?

4. Kia instrua metodo estis aplikata?
5. Kiaj personoj instruis? Kiel ili montris sian kompetentecon pri Esperanto?
6. Ankaŭ en okazo, ke en via loko (lernejo, Instituto) Esperanto ne estis instruata, ni dezirus scii, ĉu ĉe vi troviĝas iu persono, kiu volus kaj estus kompetenta instrui la lingvon. Ĉu la koncerna persono faris ekzamenon ĉe la Esp. Instituto kaj kiun, ĉu elementan aŭ superan? Ĉu li aŭ ŝi estas preta fari tian ekzamenon en proksima estonteco?
7. Kiajn rezultojn havis la instruado? Kiajn prognozojn faris la lernantoj? En kiuj lernejoj aŭ institutoj kaj en kiuj stadij vi trovis la instruadon plej sukcesanta kaj tial plej rekomendinda? Kia metodo montrigis plej bona ĉe la instruado?
8. Kion vi povas diri pri la ĝisnuna disvastiĝo de Esperanto aŭ pri la premioj por ĝia disvastiĝo en via loko? Kiom da personoj, laŭ via scio, interesiĝas pri Esperanto? Ĉu ili apartenas al la Esp. grupo (nombro da membroj)? Kiuj sociaj rondoj laŭ via opinio plej interesiĝas pri la afero?

La demandaro estas nur antaŭ nelonge dissendita al ĉiuj mezaj (duagradaj) lernejoj en la lando, diversaj klerigaj institutoj ktp. kaj ankaŭ al

gvidantaj Esperantistoj en ĉiuj lokoj. Mirinde estas, ke malgraŭ la mallonga tempo pasinta oni jam ricevis multajn respondojn, inter kiuj troviĝas ĝis nun eĉ ne supozitaj kaj alie apenaŭ kolekteblaj informoj. Kaj eĉ evidenta kontraŭulo de nia afero opinias sia devo respondi al la enketo — eble nur pro tio, ke en ĝi estas menciata la oficiala papero de la Ministerio.
Ĝenerale la enketo jam donas valoran materialon por la propagando kaj por la estonta organizo de la instruado de Esperanto, kaj eĉ la neaj respondoj estas tre utilaj, montrante la atakotajn lokojn.
Ni do urĝe konsilas, ke ankaŭ en aliaj landoj oni aranĝu similajn enketojn; en grandaj ŝtatoj oni povas aranĝi ilin laŭ provincoj. Oficiala postulo de iu ŝtata oficejo estas ja dezirinde, sed ne absolute necesa — la ĉefa afero estas, ke la demandaro mem estu konkreta kaj preciza,

Oficialaj Scilgoj pri la Sciencaj Organizacioj.

Per afabla cedemo de s-o Jung, redaktoro de tiu ĉi gazeto, ni ricevos en ĉiu 1-a) numero de ĉi monato sufiĉe grandan spacon por niaj Oficialaj Scilgoj, ĝis kiam nia Sc. Revuo povos aperi! La hodiaŭa numero de ET estas sendata senkoste al ĉiuj aliĝintoj kaj al multaj varbotoj; ni rekomendas al ĉiuj havigi al si la plajn numerojn kun niaj raportoj. Ni elektis ĉi tiun gazeton, ĉar ĝi efikas la malplej grandajn elspezojn al niaj aliĝintoj!

Raporto (komp. ET n-o 63!).

La hodiaŭa stato estas: 225 aliĝoj el 26 landoj en 4 kontinentoj (nova: Afriko). Tiu nombro ne entenas la aliĝintojn, kiuj sin anoncis ĉe la diversaj komitatanoj kaj ankaŭ ne la T. E. K. A.-anojn.

Jenaj efektiva aŭ provizoraj komitatanoj akceptas volente aliĝilojn el siaj landoj:

- | | |
|---|--------------|
| Prof. Alessandro, Via San Pietro 92, Padova | p. Itali. |
| S-o Bonnevie, Berglens gate 11, Kristiania | p. Norvegi. |
| Prof. de la Faille, Rbellstraat 8, Arnhem | p. Nederl. |
| D-ro Jam. Johnston, 15 Lr. Fitzwilliam Street, Dublin | p. Brili. |
| Prof. Kamaryt, Telocvična 3, Bratislava | p. Ĉeĥoslov. |
| Prof. Krestanoff, str. Venelin 9, Sofia | p. Bulgari. |
| S-o v. Medem, Smelju gate 12, Kaunas | p. Litovl. |
| D-ro Mühlhaupt, Schauptgasse 55, Bern | p. Svisl. |
| Ing. Prately, 469 Clarke Avenue, Westmount, Que. | p. Kanado |
| D-ro Robin, Marszalkowska 115, Warszawa | p. Poll. |

S-o Setälä, Alberga p. Finnl.
D-ro Stamatiadis, Str. Tepe-Bachi 59, Pera, Konstantinopolo p. Turkl.
Ing. Vandevelde, Zwartehelare 250, Gentbrugge-Melrebeke (O. Fland.) p. Belg.
de Villa (Habana) nun ĉe: Van Aelst, 107 R. Emile Feron, St-Gilles, Bruxelles p. Kuba ins.
S-o Wagner, Fabinstr. 2, Sibiu, Transilv. p. Rumanl.
Adv. Wilken, 4 Faradhe str., Alexandria p. Egiptl.
D-ro Döhler, Goethestr. 55, Riesa/Elbe kaj (prov.) ĉiuj aliaj landoj Germanl.
Plue estas komitatanoj:
Prof. Carl, Paris; D-ro Steche, Leipzig; Stettler, Bern; Verax, Paris; pastro Ĉe, Cluj; kaj D-ro Bichirsky, Praha, delegito de T. E. K. A.

Post intertraktoj kun T. E. K. A. ni povas ĝoje diskonigi, ke principe efektiviĝis interkonsento inter la du amikaj Asocioj, laŭ kiu ambaŭ varbos kaj propagandos unu por la alia, ke T. E. K. A. fariĝos Sekcio de I. S. A., ke la projektata Revuo samtempe fariĝos la provizora oficiala organo de T. E. K. A., ktp. Detalaĵoj sekvos. Precipian dankon meritas D-ro Robin.
Tial la nunaj membroj de TEKA ne bezonas anonci sin al I. S. A. (ili fariĝos samtempe anoj de I. S. A.) kaj reciproke.
Kelkaj miris pri la stranga diverseco de la kofitoj! Bonvolu pripensi, ke la sekretario ricevis en Praha la oficon tute neatentita, kaj ke li ne estis preparinta ion. Nur por eliri el la embaraso (neniu subsignas nelimititan ĉekon!), ni rapide fiksis la kofitojn laŭ tiuj de U. E. A. en 1921! Bonvolu ne intermiksi niajn kofitojn kun tiuj de U. E. A. en 1922! Atentu la plialtiĝon por poloj! La kofitoj estos alifiksataj je la fino de 1922 por la jaro 1923!

Kuraĝe antaŭen en la jaro 1922!
Riesa, la 23-an de dec. 1921.
D-ro Walter Döhler, sekretario.

La apero de la Revuo.

Per la kresko de la nombro de niaj anoj, la Revuo baldaŭ estos certigata. Tial mi nun alvokas al kunlaboro kaj kunverkado! Pri la enhavo informas la prospekto. Agu laŭ ties konsiloj!
La redaktadon de la 3-a parto (terminologia) afable prenos sur sin s-o Eugen Wüster, Berlin-Charlottenburg, Berliner Str. 23, al kiu oni sendu tiurilatajn artikolojn.

La alsendon de ĉiuj aliaj artikoloj petas provizore la sekretario. Estus konsilinde unue skribi al la sekretario la intencojn, ke ni povu eviti duoblan laboron! Jen ekz. kelkaj titoloj de laboraj atendataj: 1-a p. Esperanto kaj la sciencistaro en laŭ la laŭ la . Isto bezonas helplingvon? Duobla eltrovo de matematika teoremoj pro nekono de lingvo. La leĝo de prioreco en biologio kaj la lingvoj. Poresperantaj eldrol de famaj sciencistoj, ktp. Precizaj dato!

2-a p. Listo de Esp. literaturo pri (iu scienco). Historio de (Esp. sciencia unuigo aŭ publikajo) en la jaro . La sciencaj artikoloj kaj esprimoj en la jarkolekto . de (gazeto malaperinta kaj malmulte konata) ktp.

3-a p. Praktikaĵo spertoj ĉe sciencia laboro, per Esperanto subtenata. Petoj kaj demandoj rilate difinitajn sciencajn esplorojn. Proponoj al tio, ktp.

Listo de poresperantaj gazetoj
iam nun devas esti starigata! Se ni deklaris en la propagandfolio: „Originalaĵoj apartenas en la jam ekzistantajn fakgazetojn“, ni devas komenci kolekti la titolojn de ĉiuj gazetoj, kiuj enpresas Esperanlingvajn artikolojn. Tiun agadon daŭrigu poste la Asocio per siaj Sekcioj ktp. Multaj el niaj anoj certe havas rilatojn kun bonaj internaciaj fakgazetoj. Ili laŭvole jam nun intertraktu kun

la redaktoroj, ĉu tiuj gazetoj enpresus artikolojn en nia lingvo. Mi pensas, ke oni diferencigu tri gradojn de „poresperanteco“:

- A. Oni permesas Esperantajn resumojn.
- B. Oni permesas Esperantajn artikolojn recenzajn kaj statistikajn.
- C. Oni permesas ĉiajn originalaĵojn en nia lingvo.

La maniero de dulingva teksto (nacia apud Esperanta) ŝajnas al mi ne pripensinda por la nuntempo kun ĝia malbon-ekonomia stato.

Mi petas sendi al mi la titolojn kun notoj pri la enhavo de itaj poresperantaj gazetoj, por ke jam en la 1-a numero de la Revuo malgranda listo povu aperi. Bonvolu ankaŭ atentigi la redaktorojn, ke la Asocio aranĝos institucion, kiu senpage kaj volonte kontrolos la artikolojn laŭ formo kaj laŭ enhavo. Ni avertas kontraŭ nekontrolitaj artikoloj kaj deklaras, ke Esperanto estas senrespondeca je ili.

Vera Esperantisto ne ĉagreniĝos pri tiuj frazoj: la malutilo, kiun kaŭzus unu malbona artikolo (laŭforme aŭ laŭenhavo), kiun eble kontraŭulo enŝovigis, povas malkonstrui ĉion, kion ni pene perlaboris!

Organiza plano de la Asocio.
(Propra opinio de la Sekretario.)
Kelkaj kaŭzoj instigas min elmontri mian opinion pri la Asocio:

S-o Rollet de l' Isle transdonis al mi la grandan honoron (kaj pli grandan laboron) organizi mem la Asocion! Krom ke la asociaj demandoj ne estas entenataj en la Regularo de la Komitato por Novstarigo (tial eble rifuzotaj de kelkaj k-anoj), longa letera voĉdonado forrabas al ni gravan tempon. Plue: la abonpromesintaj subskribis difinitivan programon, sed la membroj ne, kaj tial devas rajti kunagi kaj kundestini.

* Pro la fervoja striko la manuskripto tiun ĉi fojon bedaŭrinde malfruigis kaj ne plu povis aperi en la numero de 1. Jan. — Ni proponas, eventuale aperigi malpli longajn Sciligojn en ĉiu dua numero. — Red.

do facile respondebla. Poste oni ordigu la materialon, por ke ĝi fariĝu uzება por la sekretararo de la Ligo de Nacioj.

Ĉi tion mi ja skribas ne por instrui personojn, kiuj eble estas pli spertaj en propagandaj aferoj, sed ĉar mi vidas, ke la metoda agado de la Finnlanda Asocio estas fruktoporta, kaj ĉar mi estas firme konvinkita, ke ni devas internacie koordini nian propagandon. Bedaŭrinde, en la Esperantistaj gazetoj oni plej ofte legas nur pri la atingitaj sukcesoj mem — pri la ĉefa afero por la propagandisto: kiamaniere oni atingis la rezultaton, ili nenion diras. Ni finnlandanoj estas pretaj pleniĝi ĉi tiun mankon, kaj ni esperas, ke ankaŭ aliaj informos nin pri siaj labormetodoj, kaj ke tiamaniere inter la naciaj propagandistoj naskiĝos vigla interrilato por reciproka subteno en la propagando.

G. Ĉ., Helsingfors.

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors, Finnlando

6.-12. aŭgusto 1922.

Tria Komunikilo.

1. *Vivkostoj en Helsinko.* La cifero 1 signifas unuarangan hotelon aŭ restoracion, II duaradan, III pensionon aŭ „hejmon por vojaĝantoj“ (puraj kaj komfortaj), IV malkaran manĝejon (ankaŭ ĉi tiuj tre rekomendindaj). Loĝejo: I 35—70 mk. (du litoj 50—100 mk.), II 30—50 mk. (du litoj 40—70 mk.), III 25—35 mk. (du litoj 35—50 mk.). Teo aŭ kafe kun buterpano 5—6 mk. Matenmanĝo (lunĉo) I—III 12—15 mk., IV 8—9 mk. Tagmanĝo I 20—25 mk., II 15 mk., III 12 mk., IV 6—10 mk. Vespermanĝo same kiel tagmanĝo. Vegetara matena, taga aŭ vespera manĝo 7—9 mk. — Pri malkaraj loĝejoj ni informos poste.

2. *Aligo.* La aliĝilo nun estas preta kaj sendita kun la Esperanta gazetararo en ĉ. 40,000 ekzempleroj. Se iu tiel ne ricevis la aliĝilon, bonvolu peti ĝin de la L. K. K.

Ni reatentigas, ke nur aliĝoj kun kotizo estas registrataj. La jam aliĝintaj estas petataj pleniĝi kaj alsendi la aliĝilon.

3. *Pritraktotaj aferoj.* Ni atentigas la samideanojn, ke ĉiuj pritraktotaj aferoj estas informotaj al la L. K. K., per adreso de Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Paris, antaŭ la 1-a de majo 1922.

4. *Fakaj kunsidoj.* La L. K. K. konsideras la sukceson de la fakaj kunsidoj tre esenca por la ĝenerala sukceso de la kongreso, tiel je propaganda vidpunkto kiel ankaŭ por la progresado de nia interna movado. Tial la L. K. K. iniciatas, ke diversaj fakaj organizoj invitu kaj arangu la fakajn kunsidojn. En niaj komunikiloj ni informos la adresojn, al kiuj povas sin turni la samideanoj, kaj laŭeble la societajn invitantojn.

Laboristoj. Laborista Esperantista Societo „Unueco“ kaj la Kleriga Ligo Laborista (Finnlando). Adreso ĉe Työväen Urheiluliitto (Laborista Sportligo), Eläintarhantie 1, Helsinko.

Blinduloj. S-o R. Bergh, Gengatan 3.

Kristanoj. Pastro H. Pätilä, Vuolenskoski, Luusikylä.

5. *Antaŭkongresa ekskurso* trans la Polusa cirklo. Ĉar kelkaj samideanoj el Italio esprimis la deziron viziti la bordojn de Glacia Oceano, ni decidis iniciati ekskurson al Petsamo, la nova teritorio de Finnlando ĉe la Glacia Oceano. Ĉi tiu vojaĝo kompreneble estas tre longa kaj parte peniga, tiel ke ni povas ĝin rekomendi nur al

grandaj turistoj, sed cetere neniu ekskurso pli plene valoras la penojn. Ni aludas al la ilustrita artikolo en Esperanta Finnlando, decembro 1921.

— La partoprenontoj devos elveturi el Kristiania, ĉefurbo de Norvegio, la 9an de julio; ili povos resti unu tagon en la interesaj urboj Trondhjem kaj Tromsø, kaj alvenos al Vardö la 16an nokte. Ĉis tie la vojaĝo okazos en unuaklasa vaporŝipo. De tie oni daŭrigos per motorboato al Petsamo, kie oni alvenos antaŭ la malvegiĝo de suno, kiu okazos la unuan fojon en la somero la 17an de julio, certe ankaŭ tiam nur por kelkaj minutoj. La meznoktan sunon la ekskursantoj vidos almenaŭ trifole. En Petsamo ili restados ekskursante kaj fiŝkaptante 7-10 tagojn, por poste ekveturi laŭ riveroj, lagarol, ŝoŝeo, per boatoj kaj poŝta aŭtobuso ĝis Rovaniemi, kie ili eniros fervolan kupeon. La 3an de aŭgusto ili alvenos en Helsinko, kie ili do havos du plenajn tagojn por ripozo kaj rigardado de la urbo, se ili ne volas uzi tiujn al ekskursoj. — La ekskursantoj, kiuj eble ne kuraĝos alveturi tra la dezertoj, laŭ riveroj kaj lagoj, povas reveturi laŭ la linio Vardö—Narvik—Haaparanta—Tornio—Helsinko, per vaporŝipo kaj vagonaro. — La kostoj de vivado en Petsamo estas ĉ. 50 fmk. tage. La veturo tra la dezertoj kostas 1,200—1,800 fmk. (laŭ la nombro de partoprenontoj), de Petsamo ĝis Helsinko, kun manĝo, tranoktado kaj ĉio enkalkulata. La vojaĝo ira Narvik proksimume egale. Biletprezoj: fervoje Kristiania—Trondhjem I 134,—, II 67,—, III 39 3/3, ŝipe Trondhjem—Vardö I 117,50, II 75,—, III 47,50 norvegiaj kronoj.

6. *La poŝtkartoj kaj reklamsignoj* promesitaj pretiĝas en mezo de decembro kaj estas sendataj al ĉiuj mendintoj. Mendu kaj uzu kiel eble plej multe!

7. *Donacoj.* La LKK danke notas la jenajn donacojn: Suomen Messut O. Y. (Finnlanda Foiro), Helsinko 1000 fmk., s-o ing. Gustav Zitting, Helsinko 1000 fmk., s-o H. Salokannel, Laihia 100 fmk., s-o H. Sinerlehto 15 fmk., f-ino Irene Salokannel 10 fmk., f-ino Siri Mustonen 10 fmk., ĉiuj el Helsinko; s-o Artturi Salokannel, Punkaharju 15 fmk. Sume 2180 fmk. Antaŭa sumo 820 fmk. Entute 3000 fmk.

8. *Blinda kaso.* La LKK danke notas la jenajn donacojn por la eldona kaso de blindaj Esperantistoj: s-o Esko Boellus, Tampere 14 fmk., s-o Vilho Setälä, Alberga 20 fmk. Sume 34 fmk.

9. *Garantia kapitalo.* La LKK danke notas la jenajn garantiojn: s-o Esko Boellus, Tampere 500 fmk., s-o C. van Doorne, Rotterdam 300 fmk., s-ino Wijngaard, Rotterdam 300 fmk. Sume 1100 fmk. Antaŭa sumo 2900 fmk. Entute 4000 fmk.

10. *Novaj aliĝoj:*
39-40. Ges-oj Oskar kaj El. Bünnemann, Hamburg.
41. S-o Konrad Ojala, Helsinko.
42-43. Ges-oj Pätilä, Vuolenskoski.
44-45. S-oj B. kaj C., du poste elektotaj lernantoj de s-o J. Grünthal, Haapsalu.
46-47. Ges-oj Hanna kaj Hanna Koivu, Viipuri.
48. S-o Martti Dahlström
49. F-ino Siiri Salkkola
50. F-ino Marta Ropponen
51. S-o S. T. Koivisto
52. S-o Martti Turunen
53. S-o Vilho Salonen
54. S-o Oskari Eriksson
55. F-ino Hilda Airikka
56. S-o A. Lappalainen, Helsinko.
57. S-o D. Tannenbaum, Wien
58. Delegoto de Internacia Specimena Foiro de Praha
59. S-o Nestor Lindholm, Paimio.
60. S-o Unuo Pesonen, Alberga.
61. S-o J. Neuman, Turku.
62. S-o O. Kettunen, Joensuu.
63. S-o Walter Taddiken, Zetel i. Oldbg.
64. S-o O. Rieck, Grellwald
65-66. Ges-oj Esko kaj Tyne Boellus, Tampere.
67. S-o Aksel Lindroos, Kotka.

El la aro de la delegitoj la Estraro de la Asocio destinu 1 po lando kaj po scienca fako, kiu prenas sur sin la konfidencian oficon de kontrolanto (komp. la rubrikon: listo de poresp. gazetoj)

Naciaj sciencaj ligoj.

La ekzemplo de „Deutsch-Akadem. Esp. Bund“, kiu verŝajne korporacie aniĝos al I. S. A., devigas min, pripensi ankaŭ tion. La membroj el unu lando havu la rajton, sendevige formi nacian ligon, kiu precipe prenos sur sin la varbadojn inter la sciencistaro de la lando. Per traduko en nacian lingvon de barbarikoloj kaj enmetigo en gazeton (aŭ aldonigo) ĝi multe povus utili al nia afero! Estas dezirinde, ke la nacia ligo agu konforme kun la Konsulo (seeble unupersoneco).

Mi esperas ricevi al ĉi mia opinio multajn kritikojn, precipe de la iama estraro de I. S. A., de la Komitato de TEKA kaj Kom. p. Novstarigo, kaj ankaŭ de niaj membroj.

Kiu volas aktive kunlabori (t. e. preni sur sin laboron aŭ oficon) por la Sekcioj de Specialistoj, skribu al la sekretario.

Kiu volus preni sur sin la oficon de Delegito, sin turnu al la komitatano de sia lando. Se T. E. K. A. ne preferos, konservi siajn konsulojn por sia sekcio mem, la du komitatoj elektos la konsulojn unue el la komitatanoj resp. konsuloj, kaj, por landoj ne reprezentitaj ĝis nun, el la delegitoj. Se estas pli ol 1 sinjoro el 1 urbo preta, iĝi delegito, mi konsilas amikan kunagadon kaj post interkonsento enlistigon de nur 1 delegito.

Subita Striko


de fervojistoj bedaŭrinde kaŭzis gravan malfruigon de la antaŭa numero de ET. Ni ekspedis la journalon al la poŝto kiel kutime; sed pro la fervojista striko ankaŭ la poŝto ne povis funkcii. Ni esperas, ke jam la hodiaŭa numero denove alvenas akurate.

68. S-o Joh. Tamverk, Haapsalu.
69. S-o Ferd. Peter Huber, Salzburg.
70-71. Ges-oj C. van Doorne kaj Wijngaard, Rotterdam.
72-73. Ges-oj I. Esser kaj M. Esser-Carruthers, Rotterdam.
74. S-o Rudolf Strauss, Halle.
75-76. Ges-oj Lauri kaj Julia Salmi, Viipuri.

La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj: Germanio 10, Anglando 7, Holando 6, Estonio 4, Ĉeĥoslovakio kaj Francando po 3, Aŭstrio, Pollando kaj Svislando po 2, Finnlando 37, entute 76 aliĝintoj el 10 landoj.

La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensondoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko, Finnlando.
— Telegrafa Esperanto, Helsingfors.



Pentrinda bildo el suda Svislando.

Vizito ĉe la eltrovinto Schoop.

Grave! Ni invitas la propandandistojn de Esperanto, publikigi tradukon de la sekvanta artikolo en la nacia gazetararo. De la aperintaj artikoloj oni bonvolu sendi po unu ekzempleron al: sinjoro M. U. Schoop, en Zürich 5 (Svislando), Hardturmstr. 78.

U.— Dum la lastaj tagoj mi havis la plezuron, paroli kun grava svisa industriisto, la eltrovinto de la „metaliza pistolo“, s-o M. U. Schoop en Zürich.

Se oni ne multe legas pri tiu agema kaj sukcesinta eltrovinto, tio okazas, ĉar li ne ŝatas esti „intervjuata“ de gazetistoj kaj laŭdata pli ol aliaj homoj, „kiuj ja ankaŭ plenumas sian devon, laŭ siaj kapablo kaj povoj“.

Malgraŭ tiu modesteco, la grava Franklin-Instituto en Philadelphia honorigis s-on Schoop antaŭ kelka tempo per la ora medalo „John Scott“, pro liaj grandaj meritoj pri la evoluado de la metala tekniko. Kaj en lia oficejo en Zürich mi vidis gratulajn leterojn de la morfinta grafo Zeppelin, de la mondfama Thomas A. Edison, de profesoro d'Arsonval kaj de multaj aliaj eminentuloj.

Esperanto inter knaboskoltaj.

Eble la legantoj de ET ŝatus scii pri la antaŭenigo de la „kara lingvo“ de frateco inter la knaboskoltaj de la mondo.

La historio de la SKOLTA ESPERANTISTA LIGO estas romantika kaj plena je malfacilaĵoj kaj skeptikaĵoj, ĉiam spertitaj de novaj movadoj kaj utopioj.

La nuna prezidanto de SEL, ankoraŭ juna viro, estas la elpensinto de la Ligo. Dum la pasinta terura militigo li sin-trovis sur la batal-kampo, tamen ne por mortigi la malamikojn de sia patrujo sed, kontraŭe, por flegi la vunditojn de ĉiuj armeoj — vere pacaj, dia tasko. Li estas vera, sincera pacamanto kaj eĉ dum li sin trovis meze de la inferno de moderna batalado, liaj pensoj ĉiam estis pri la paco, kiu devos veni post la batalado. Li pensis pri la du ekzistantaj pacemaj movadoj, la Esperanta kaj la knaboskoltaj, kaj li komencis ellabori proponojn por la interligo de la du.

Li jam estis skolto kaj Esperantisto kaj eĉ, dum li estis en la tranĉejoj, li skribis siajn pensojn sur papero kaj sendis al sia pli juna frato (kiu ĝis tiam ne estis sufiĉe aĝa por esti soldato) la manuskripton de broŝuro „Propono pri Skolta Esperantista Ligo“.

Lia frato, kiu estas studento ĉe hospitalo, donis siajn liberajn horojn al la nova, proponita ligo por ĝin propagandi kaj flegi ĝis la fino de la milito kaj la reveno de sia soldato-frato. Tiu junulo ne sciis multe pri Esperanto, kaj liaj liberaj horoj estis limigitaj; tamen li persiste laboris, kaj Dio benis liajn penojn.

Hodiaŭ la Ligo havas anojn en multaj landoj kun naciaj agentoj en dudek-tri landoj. Ĝi estas bone kaj afere organizita kaj ĉiutage kreskas.

La metodo, eltrovita de Schoop, tute revoluciigis la metalizan teknikon. La aparato estas relative malgranda kaj havas la kutiman formon de pistolo. Ĝi, ĉe pistolo, oni enŝovas la patronon, tle Schoop enirigas metalfadenon (el metalo laŭvola, ekz. kupro, zinko, plumbo, fero, stano, aluminio); ĝi estas fandata en la interno de la pistolo per gasflamo aŭ elektro; poste la likva metalo estas elŝprucata per tri-atmosfera aerpremo el la pistolo sur la surfacon de la objekto metalizota.

La zinkizo, kiel rimedo kontraŭ la rustado de fero, estas plej multe ŝatata; ĝin uzadas depost tri jaroj la grandaj laborejoj de la Svisa Federacia Fervojararo kaj de la elektra Gotthard-Fervojo.

La metaliza metodo jam estas konata ĉie en la mondo, kaj ekzistas grandaj laborejoj, ekspluatantaj ĝin, en Paris, Berlin, Praha, Torino, Boston, Birmingham, Tokio kaj aliaj urboj. Pro tiu universaleco de la procedo mi kuraĝis direkti al s-o Schoop ankaŭ la demandon pri mondlingvo ĝenerale, sciante, ke eĉ la Ligo de Nacioj estas tre favora al tiu problemo. Mia surprizo estis granda, kiam li respondis:

„La helplingva ideo ŝajnas al mi ne plu forpuŝebla, ĉar la tuta mondo suferas pro la lingva kaoso en la internacia vivo. Felice la problemo jam estas ĝenie solvita per „Esperanto“ de D-ro Zamenhof. En mia firmo mi jam de du jaroj utiligas Esperanton por korespondado kaj reklamo, kaj mi devus mensogi, se mi volus diri, ke Esperanto ne plene taŭgas! Ankaŭ aliaj svisaj firmoj praktikke uzadas Esperanton kaj mi kredas scii, ke ankaŭ ili estas tute kontentaj pri la taŭgeco de la lingvo kaj ĝia jam tutmonda disvastiĝo. La ŝtatoj, kiuj instruigas „Esperanton“ en siaj lernejoj, estas do tre gratulindaj pro sia progresemo. Ili donas al la junularo instrumenton, kies pedagogia valoro kaj praktika utileco ne plu estas diskutebaj. Ne teorioj, sed la reala vivo fine decidis: ĝi devigas nin, ĉiel subteni Esperanton!“

Adiaŭante min de la fama eltrovinto, mi pensis, ke „Esperanto“ kaj la „metalizado“ la estas bonaj fratoj. Ĉiam mi admiris la Esperantistojn pro ilia senlaca laborado: spite de ridoj kaj mokoj ili dum 30 jaroj ne laciĝis kaj kondukis la lingvon de sukcesoj al sukcesoj, tiel, ke ĝi penetris eĉ en la Ligon de Nacioj. Por atingi tiajn sukcesojn, kvazaŭ superhoma energio estas necesa. Preskaŭ mi kredas, ke la Esperantistoj disponas pri nervoj metalizitaj, — metalizitaj nature laŭ Schoop.

Scienco.

Esploro de la Balta Maro.

Nia korespondanto s-o H. Sakaria en Tallinn (Reval), skribis al ni pri la kongreso de estonaj, latvaj kaj finnaj maresplorisitoj, okazinta la 25. kaj 26. okt en Tallinn, ĉefurbo de Estonio:

Ĉeestis i. a. profesoroj de la universitatoj en Helsinko kaj Tartu (Dorpat). Per la rezolucioj, tuŝantaj tre diversajn temojn, estas postulate aranĝo de statistiko pri la fiŝkaptado; interalle, ĉiu ŝtato esplorigu ian certan fiŝon (Finnlando la salmon, Estonio la anĉovon kaj angilon, Latvio la salmon, moruon, pleŭronekton). Estu aranĝataj esploroj de la baltmara planktono, de la interrilatoj inter la planktono kaj la fiŝaro. En majo, aŭgusto kaj novembro estu aranĝataj esplorveturoj al 20 lokoj en la estonia zono, al 15 lokoj en la latvia por mezuri la temperaturon de la akvo kaj ĝian salprocenton en la profundo je 0, 5, 10, 20, 30, 40 ktp. metroj, krome la kvanton de enhavata oksigeno; esploro — trifoje ĉiutage — de la alteco de la marnivelo, de la flosa glacio ktp.

La CENTRA KOMITATO konsistas el prezidanto, ĝenerala sekretario, kasiŝto, propaganda fakestro, korespondanta fakestro kaj kelkaj ordinaraj komitatanoj.

Ĉiuj propagandaj aferoj estas sub la gvido de la propaganda fakestro, kiu volonte donos ĉiujn informojn pri la Ligo, aranĝos artikolojn pri la Ligo, paroladojn, ktp.

La korespondanta fakestro aranĝas interkorespondadon inter la Ligoj, kaj tiu interkorespondado kuraĝigas la spiriton de internacia frateco, kiu estas unu el la ĉefaj celoj de la Esperanta kaj skolta movadoj.

En Londono, sub la aŭspicioj de la Ligo, stariĝis lastatempe LONDONA SKOLTA ESPERANTISTA KLUBO, kun sekretario, ktp.

El Ameriko ni ricevis novaĵojn pri kunveno de SEL-anoj.

Ĉe la kongreso en Hollando (aŭg. 1920) kelkaj anoj de SEL ĉeestis: ankaŭ ĉe la XIII-a en Praha la Ligo estis reprezentata.

Ni bezonas helpon — kasan kaj moralan — kaj ŝatus ricevi petojn de neskoltoj kaj skoltaj Esperantistoj pri aniĝo kaj helpo.

Niaj celoj estas kvin, nome:

1. Disvastigi la skoltajn idealjn per Esperanto.
2. Disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltaj.
3. Krei skoltan literaturon en Esperanto.
4. Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon.
5. Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Kiu volas antaŭenigi tiujn subtenindajn celojn, aniĝu tuj al nia Ligo. Skribu al la ĝenerala sekretario, s-o Norman Booth, M. P. S., Netherton, Huddersfield, Anglujo.

Antaŭen la Skoltismo mano ĉe mano kun Esperanto!

J. W. Leslie, propaganda fakestro de SEL.

La kongreso estis sekvo de la konferenco por la esploro de la Balta Maro, aranĝita de 13-19. julio en Kopenhago de la Internacia Komitato por Esploro de Maroj. La celo de la komitato estas: konatigi kun ĉiuj hidrografiakaj kaj biologiaj interrilatoj, elabori plej raciajn kaj laŭcelajn leĝojn kaj metodojn por seneksterma fiskaĵo.

Insistan Alvokon pri Helpo

sendis al ni la Centra Helpkomitato de Kuracistoj en Aŭstrio, kiun ni bedaŭrinde ne povas plene publikigi pro la manko de loko en nia ĵurnalo. Mondsendojn oni bonvolu adresi al: Zentral-Hilfskomitee der Aerzte Oesterreichs, Wien I, Bären-gasse 1 (Aŭstrio). Bonvolu sendi monon nur en propra nacia valuto.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pluaj donacoj: 110. Hans Reuss, Essen 7 gmk. — 111. Laŭ „Germ. Esperantisto“ n-o 11: 95 gmk. — 112. Esp. Grupo Potsdam (per „G.E.“) 10 gmk. — 113. G. van Heek, Hengelo 10 hol. guld. — 114. N. Barthelmess, Düsseldorf 10 gmk. — 115 V. Hendrickx, Gent 2 bfk. — 116. W. Markuse, Berlin-Wi. 10 gmk. — 117. A. Janečka, Vitkovice-Ostrava 5 Kč. — 118. Max Hofmann, Chemnitz 10 gmk. — 119. R. E. 10 gmk. — 120. Gaševskij, Sofla 20 gmk. — 121. S.ino M. Hankel, Dresden 10 gmk. — 122. C. Ostermann, Gera 13 gmk. — 123. Tobusch, Freiburg 100 gmk. — 124. J. M. Menschick, Regensburg 10 gmk. — 125. R. Meyer, Frankfurt 10 gmk. — 126. Landtagsabg. (parlamentarulo) Sievers, Braunschweig 100 gmk. — 127. Carl Brockmann, Uerdingen 10 gmk. — 128. K. Deubler, München 15 gmk. — 129. K. Meyerhoff, Braunschweig 50 gmk.

Entute troviĝas en nia kazo por „Esperanta Ligilo“ 5392,50 gmk., al kio venas la ŝanĝo de ĉeko de 56 fr. fk., plue 2400 kr. aŭstr., 2000 pmk., 150 Kč., 96 fr. fk., 23 dan. kr., 16 ital. lir., 15 hol. guld., 10 hung. kr., 3 sviz. fk., 2 belg. fk., 2 norv. kr. kaj 1 braz. milrejo. Negermanojn donacantojn ni petas insiste sendi nur monbiletojn de sia propra lando, ĉar ni sendos la monbiletojn neŝanĝitajn al la eldonisto de „Esperanta Ligilo“.

Internacia Esp. Servo.

LETERO EL PALESTINA.

Haifa, 18. dec. 1921.

Haifa estas centro de sekto religia nomata Babistoj aŭ Bahajstoj, kiuj vivas precipe en Persujo, sed havas ankaŭ du-tri milionojn da samreligiaj en aliaj orientaj landoj, en Eŭropo kaj Usono. Lastmonate mortis ĉe tie Abbas Effendi, tria estro de la sekto, viro tre riĉa sed ankaŭ tre bonfama kaj tial ĝenerale tre ŝatata. Miloj da personoj de ĉiuj religioj ĉestis la funebnan servon, eĉ de Jeruzalemo alvenis eksprese nia ĉefganto Sir Herbert Samuel. (Por Esperantistoj estas interese, ke unu el la principoj de la sekto — miksaĵo de islamismo, kristanismo kaj spiritismo — estas: adopto de unu sola lingvo por pli bona interkompreniĝo kaj fratamo de ĉiuj nacioj.)

La estonteco de Palestina lando restas necertigita, kaj la mandato komisiita al Britujo ne estas ankoraŭ konfirmita de la Ligo de Nacioj. Rapidaj kaj severaj kondamnoj de la krimuloj arabaj kaj judaj en la lastaj sangaj tumultoj de Jeruzalemo kvietigis la landon, sed sub la cindro daŭras ardi fajreroj de malamo.

La judoj estas pli kleraj, pli viglaj, pli riĉaj, pli bone organizitaj kaj pretendas — almenaŭ la zionistoj — transformi la landon en patrujon aŭ hejmon judan, politikan. La araboj, malpli organizitaj sed grandnombraj (80 %), ne volas perdi

sian heredhejmon nek esti ekspluatataj de fremduloj enmigrintaj kaj enmigrintaj, kiuj jam gajnis grandan influon.

Filatelistoj atendas senpacience eldonon de propraj palestinaj poŝtmarkoj, ĉar la nunaj estas provizoraj millitmarkoj surpresitaj en tri lingvoj. Depost novembro aperis la tria tipo de surpreso. La unua montras surprison araban pli malgrandan ol la ŝildeto E. E. F., la dua surprison araban pli grandan ol la ŝildeto, la tria nuna montras literojn anglajn pli klarajn. Sed kia estos la estonta emblemo de palestinaj poŝtmarkoj, stampoj, moneroj, flagoj, ktp.? Por kontentigi ĉiujn, oni proponas: Kreskanta luno (islama) subtenanta inter siaj brakoj la du aliajn emblemojn kruco (kristana) en la centro kaj ŝildo Davida (juda) en la alto. Heraldistoj devas fiksi la kolorojn.

Sub la vidpunkto de l' arkeologio la jaro 1921 estis tre fruktodona en Palestina. Monumentoj tre interesaj estas trovitaj kaj elfositaj en la antikva urbo Askalono de la Orient-Palestina Societo, en Ain Duk apud Jeriĥo de la Fratoj Dominikanaj, en Beisan de Societo Amerikana, en Tiberias de arkeologoj hebreaj, kaj en Kafarnaum apud la lago Genezareth de la Fratoj Franciskanaj. Muzeo Centra estas konstruita kaj malfermita en Jeruzalemo, kaj kelkaj lokaj muzeoj estas permesitaj proksime de la esploritaj lokoj. P. E. S.

Junularo.

Ĉiuj junaj germanaj kaj eksterlandaj Esperantistoj (ĝis 24 jaroj), kiuj partoprenos je la XI-a Germ. Esp. Kongreso (5.-6. junio 1922 en Breslau), estas petataj sendi sian adreson al la sekretariejo de la „Asocio de Junaj Germ. Esperantistoj“, loka grupo Breslau: s-o Erich Habelok, Breslau, Germ., Schleiermacherstr. 19, por la unua unuĝo-tago de la Asocio.

Lernejo.

La germanaj filologoj.

Ofte ni konstatis la bedaŭrindan fakton, ke la instruistoj ĉe la germanaj superaj lernejoj (kutime oni nomas ilin filologoj) estas koleraj malamiko de nia afero. Ŝajnas do granda sukceso, ke nun kelkloke tiuj ĉi rondoj ŝanĝas sian pozicion; ekzemple la „Sciigoj de la Saksa Filologia Unuiĝo“ raportis kelkfoje pri Esperanto senkritike, eĉ presigis mallongan alvokon por nia movado. Same s-o prof. Messer (Giessen) defendas la Hessen-an kultoministron pro lia poresperanta edikto en tre leginda artikolo, kiu aperis en grava germana pedagogia revuo „Paedagogisches Zentralblatt“ 6-a kajero 1921.

Komerc.

Komerca ĉambro de Lausanne por Esperanto.

(Traduko.) Lausanne, 22. nov. 1921.

Al la Lausanne'a Esperantista Grupo La Glane, Montétau

Lausanne.

Sinjoro Prezidanto kaj Sinjoroj!

Ni havas la honoron anonci al vi la ricevon de via letero de 31. okt., por kiu ni vin dankas. La estraro de la komerca ĉambro kun intereso notis la sciigojn, kiujn vi donis al ni, kaj decidis doni sian moralan apogon al la Esperantista movado, kiun vi rekomendas. Kun plezuro ni kongras al vi tiun decidon, aĉdonante al ĝi niajn plej bonajn dezirojn por la disvastiĝo de Esperanto.

„Kiel eble plej bone, sinjoro. Tamen se homo nur sidas sur benko kaj ĝemetas... Jes! La afero efektive ne estas facile klarigebla. Li havas la rajton same kiel ĉiu alia sidi sur la benko kaj ĝemi eĉ ĝis mateno. Rigardu nur, ĉu li ne entreprenos ion pli malbonan. Debltown fidus al via vigleco, John! Eble la fremdulo iros al rivero, eble li atendas la okazon pribari fervojan vagonaron, kiel tio antaŭ nelonge okazis apud Madison. Observu ankoraŭ iom da tempo, Kelly!“

Dikinson haltis kaj aŭskultis: vagonaro alproksimiĝis al la stacidomo. La juĝisto alrigardis John'on per siaj akraj okuloj kaj diris: „John!“

„Sinjoro juĝisto!“

„Mi multe eraras, se vi trovos lin sur la sama loko. Li deziras trompi vian viglecon, kaj li atingis sian celon. Verŝajne li finis sian aferon, kaj li estas nun envagonegonta. Rapidu, John!“

La fenestro de Dickinson brufirmiĝis, kaj John Kelly flugkuris al la stacidomo. La senintenca viro sidis kun klinita kapo sur la sama loko. Kelly komencis serĉi pli longan kaj pli densan ombron por alĝustigi al ĝi sian longan figuron. Ne sukcesinte, li decidis, ke li povas sidiĝi ĉe la muro de la tenejo. Post nelonge la kapo de Kelly tute senkonscie sin apogis al la muro, kaj li dolĉe ekdormis. La juĝisto Dickinson ankoraŭ atendis tomere, sed ĉar la policano ne revenis, li decidis, ke la senintenculo sidas tiel same kiel antaŭe. Li jam volis estingi sian lampon, kiam oni raportis al li, ke lin deziras vidi pro urĝa afero viro jus alveninta per la lasta vagonaro.

Efektive, en lian ĉambrom rapidpaŝe eniris sinjoro de iom nedifinebla aspekto, en kiu tamen la sperta okulo de la juĝisto distingis kelkajn trajtojn de detektivo.

„Vi estas la ĉi tiea juĝisto, sinjoro?“ demandis la alveninto, salutante lin.

Ni aldonas, ke la komerca ĉambro de Locarno ankaŭ al ni skribis pri tiu temo, kaj ke ni respondis al ĝi en la sama senco.

Akceptu, sinjoro prezidanto kaj sinjoroj, la esprimon de nia alteŝtimo.

Je la nomo de la komerca ĉambro:

La prezidanto La sekretario
(subskr.) Failetaz. Jurieux (?)

Foiro de Frankfurt a. M.

Laŭ sciigo de la foiroficejo la venonta aŭtuna foiro okazos ne je 24-30. sept., sed je 8-14. okt. La printempa foiro okazos, kiel jam sciigite, je 2-8. aprilo.

Kvara komerca lernejo en Paris enkondukas Esperanton.

La lernejo de alta komerca instruado por flinoj, libera instituto, rekonita de la ŝtato kaj direktata de f-ino Sanna, membrino de la Supera Konsilantaro de Publika Instruado, oficiale enkondukis Esperanton kaj nun komencis la unuan kurson.

Poŝto.

Ankaŭ en Nederlando enketo pri Eperantistaj poŝtovicistoj.

La Nederlanda poŝta kaj telegrafa ĉefestraro sekvas la germanan ekzemplon per jena faka ordo:

961. Esperanto. Konforme al peto de la „Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtovicistoj“ pri sciigo de la nomoj kaj adresoj de la oficistoj, kiuj okupas sin pri Esperanto, la interesatoj estas invitataj ensendi antaŭ la 10-a de januaro nomon, rangon kaj adreson senpere al la ĉefestraro, 6-a sekcio D, aldonante la numeron de tiu ĉi faka ordo.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Germanaj infanoj ĉe hispanaj familioj.

Laŭ alvoko de s-o Sohrmann, prez. de Esp. Asocio de Germ. Instruistoj, farita en „Esperanto“ de UEA, inter aliaj s-o Trobat el Barcelona skribis, ke li intencas akcepti germanan knabinon por almenaŭ tri jaroj en sia familio. Li sendis grandan sumon por la vojaĝo. S-o lerneŝtaro Scheibler en Niederhermsdorf elektis la plej malriĉan knabinon, Gertrud Hallas, kiun li akompanis ĝis Hamburg, kie ŝin afable helpis s-o Hoffmeister, del. de UEA, komercisto en la konata firma Harder & Voss, eksporto por nutraĵoj. S-o H. eĉ promesis al la knabino oficon kiel korespondantino en sia kontoro, kiam ŝi, reveninte el Hispanlando, bone scipovos la hispanan lingvon. La knabino bone alvenis kaj ne povas sufiĉe laŭdi la bonkorecon de la amikema familio.

Jam duan fojon s-o Trobat donis pruvon pri sia bonkoreco. Pri tio skribis al ni s-o Sohrmann en Weinböhla: Antaŭ kelke da tempo s-o Trobat skribis al mi, ke s-ino Bamona, riĉa vidvino en Barcelona, estas preta akcepti ĉambristinon el Germanujo. 18-jara knabino el la ĉi-tiea grupo deklaris sin preta iri Hispanujon. Mi raportis tiurilate al s-o Trobat. Li respondis, ke la s-ino Bamona deziras pli aĝan, 18-ĝis 20-jaran knabinon, tamen ŝi konsentus akcepti la knabinon, se amikino de ŝi (13-ĝis 14-jara) krom la citita knabino estus preta veni al s-ino Bamona. Mi nun demandis miajn Esp. lernantinojn, kaj kelkaj el ili tuj entuziasmiĝis por la ideo vojaĝi Hispanujon. Mi komunikis al s-o Trobat du nomojn, kaj s-o Tr. respondis, ke la unu knabinon fratlinon de la citita akceptos s-ino Bamona, la alian li mem. Nun tri knabinoj vojaĝis fine de 1921 al Hispanujo, dank' al la bonkoreco de s-o Trobat.

Sveda ĵurnalisto vojaĝas per Esperanto.

La kunvenojn de budapestaj samideanoj vizitis s-ano Einar Adamson, ĵurnalisto el Gefle, Sved., kiu per Esperanto vojaĝas tra Meza Eŭropo.

Recenzejo.

LIBROJ.

TRI VERKOJ DE LEO TOLSTOJ. El rusa lingvo traduktis J. M. Kun antaŭparolo de Romain Rolland 78 pg. 15 x 19 cm. Eldonis Sennaclega Asocio Tutmonda. Paris 20. 25 rue Boyer. Prezo bone karton. 3 fk. por andoj, kies monkurzo estas egala aŭ supera al la kurzo de la franca franco.

La eldonejoj plimultiĝas, kaj nia literaturo kreas, kreskas. Krom da libroj Esperantaj estas presitaj en 1921? Amasego, bonaj kaj malbonaj ĉiusepacaj. Eldonante ĉi tiun libron (n-o 1 de la kolekto) S. A. T. envicigis en la produktantajn asociojn.

Pri tri verkoj temas la enhavo: 1. Patriotismo kaj registaro, 2. Al polifilistoj, 3. Pensoj pri edukado kaj instruado. La tuto estas tradukita de lerta samideano, kies nomo modeste kaŝiĝas sub la komencaj literoj J. M. Menciante, ke la traduko estas kontrolita kaj rekomendita de E. L. A., oni sufiĉe laudas la verkon omnaman de bona portreto de la eminentulo rusa Leo Nikolajeviĉ Tolstoj. La antaŭparolon donis la fame konata franca verkisto Romain Rolland.

Jen serioza laboro sendube bone akceptata de la Esperantistaro kaj precipe de ĉiuj „Satanoj“ en Esperantujo. (G. Ajul.)

DES AILES POUR LA Pensee. PAR L'ESPERANTO. De M. Rollet de l'Isle. 18 x 21 cm. 32 pg. kaj kovrillo. Paris 1921. Havebla ĉe Centra Librojo Esperantista. 81, rue de Cluchy, Paris 9.

Pri tiu ĉi broŝuro ni deziras paroli pli detale, se la loko permesos, en la venonta numero.

GAZETOJ.

Germana Esperantisto. Dec.

La Mario. Dec.

Esperanto Praktiko. Dec.

Esperanta Finnlando. Dec.

Riĉe ilustrita artikolo pri „Vojaĝo al Petsamo“, la finna bordo de Glacia Oceano.“ 3-a kongreakomuniko.

Novaj Tempoj. Dec.

Nova hektografla revuo de proletaria edukado. Adreso: S-o Vittecoq, instruistulo, Saasot Baqueville (Seine-Inf.), Franc.

La Provo. Dec. (Zamenhof-numero. kun serba traduko de la p.emoj de Z)

Hungara Esperantisto. Dec.

Adreso: Szeged, Szentharomsag u. 30.

Hispana Esperantisto. Dec.

Gazetaro.

En francaj ĵurnaloj.

Comœdia, ĉiutaga teatra kaj literatura gazeto en Paris. 27. 12. (Artikolo „Ohe, Esperanto“ de s-o J. H. Rosny, konata verkisto, membro de la Akademio Goncourt, pri la literatura utiligo de Esp. por konigi francajn verkojn eksterlande.)

Le Petit Parisien, la plej disvastigita franca ĵurnalo, 28. 12. (Art. „Granda Espero — Esperanto“ de s-o Ch. Richet, membro de la Scienca kaj Medicina Akademio, Nobel-premiulo, kun favora antaŭparolo de la redakcio.)

La sama, 31. 12. (Granda artikolo pri Esp. kaj la komerca ĉambro de Paris, kun multaj faktoj, de s-o A. Baudet.)

En rumanaĝ gazetoj.

Aperis parte tre gravaj artikoloj en Adeverul, Bukaresto; Nagybanjal Hirlap, Baia-Mare; Deva es Videke kaj Hunyadvarmegye, Deva; Szaszvaros es Videke, Oradea; kaj en jenaj gazetoj aperantaj en Ĉiuj: Volnia, Kelel Ulsag, Eltensek, Kitzgazdasag, Patria, Uti Kelet, 8-Oral Ulsag, Gazeta Ardealului kaj Napkelet.

Allanda Gazetaro.

Unser Volk, Krefeld, Germ. (Esp. anguloj ĉiusemajre.) Dziennik Bydgoski, Bydgoszcz, Pol., n-o 294. (Art. pri Brazilia Jarcenifesto.)

Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol., 28. 12. (Esp. angulo.)

Pri la Esp. movado en Ruslando

ni ricevis lastatempe multajn manuskriptojn, parton de kiuj ni intencas publikigi en speciala numero pri la Esp. movado en Ruslando.

XXX.

Matene John Kelly venis al la juĝisto. „Nu, kiaj novaĵoj, John?“ demandis Dickinson. „Ĉio estas en ordo, sinjoro. Sed mi ankoraŭ lin observas.“

„Mi scias. Viro de malalta kresko en griza vesto?“

John Kelly respektplene ekrigardis la ĉionsciantan juĝiston kaj daŭrigis: „Li ankoraŭ sidas kiel antaŭe kun klinita kapo. Kiam matene preterpaŝis fervoja gardisto, la viro rigardis lin, kiel malsana hundo“ — diras Williams.“

„Kaj nenion plu?“

„Ĉirkaŭ la fremdulo amasiĝas somoj. La tuta perono kaj la stacidoma ĝardeneto estas plenplena.“

„Kion ili deziras, John?“

„Kredeble, ili ankaŭ deziras koni liajn intencojn. Krome, famo disvastiĝis, ke li estas la sama sovaĝulo, kiu mortigis la policanon en Nov-Jorko.“

La raporto de Kelly estis tute ĝusta. Dum la nokto la famo pri la alveninta stranga allandulo, kies intencoj vekis la suspektemon de juĝisto Dickinson, plidivastiĝis, kaj matene, kiam montrigis, ke la viro havas nenajn intencojn kaj ke li la tutan nokton sidis senmove, la urbo Debltown kompreneble eksciigis. Apud la stranga viro amasiĝis sciivoluloj, komence infanaro iranta en lernejon, poste komizoj, maŝtrinoj, revenantaj el butikoj kaj bazaroj, — unuvorte, la tuta Debltown, iom post iom vekiĝante kaj komencante sian ĉiutagan vivon, vizitis la fervojan peronon, penante kompreneble klarigi al si la intencojn de la fremdulo.

Sed tio estis tre malfacila, ĉar la viro sidis kaj sidis sur la sama loko, ĝemante, rigardante la preterirantajn kaj lafoje respondante la demandojn per tiaj nekomprenablaj vortoj. (Daŭrigita.)

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukita laŭ la 8-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Ŝidlovskaja.

(48-a daŭrigo.)

La luno jam staris en la mezo de l' ĉielo, kaj la figuro de policano Kelly fariĝis baldaŭ videbla pro la mallongigita ombro, sed la fremdulo ĉiam ankoraŭ sidis, per nenio aperigante siajn intencojn kontraŭ la dormanta urbeto.

Tiam John Kelly eliris el sia embusko kaj laŭ antaŭkonsento iris frapeti la fenestron de juĝisto Dickinson.

La juĝisto tuj malfermetis la fenestron aspektante kiel homo, al kiu oni venas sciigi tion, kion li jam de longe scias.

„Nu, John? Kien iris la fremdulo?“

„Li nenien iris, sinjoro! Li sidas ĉiam sur la sama loko.“

„Li sidas. Bone! Ĉu li per io aperigis siajn intencojn?“

„Ŝajnas al mi, sinjoro, ke li havas nenajn intencojn.“

„Ĉiu homo havis intencojn, John,“ diris Dickinson kun rideto de kompato pro la naiveco de la gardisto de Debltown. „Kredu al mi, John, ĉiu homo nepre havas iujn intencojn. Se mi ekzemple eniras panvendejon, — do — mi intencas aĉeti panon. Ĉu vi komprenas, John? Se mi enligiĝas, certe mi intencas ekdormi. Ĉu ne?“

„Vi estas tute prava, sinjoro juĝisto.“

„Nu, sed se vi vidus, — la vizaĝo de la maljuna viro akceptis ruzan esprimon, — se vi vidus, ke mi vagas noktomeze apud fervoja deponejo, esplorante serurojn kaj pordojn Ĉu vi min komprenas, John?“

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
Priskuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncon en Nederlando.
Interrilatas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciigas la kurzojn de valuto kaj valorpapiroj.

Komercistoj! Fabrikistoj!

Nur via anonco en ET ne sufiĉas!
Por atingi la intereseulojn, akiru en ĉiuj landoj interrilatojn, kiuj speciale aliras la atenton de samfakaj firmoj al via adreso!
Por Hungarlando akceptas tiun laboron en intereso de la afero nur por repago de propraj elspetoj
Hungara Esp. Servo, Hajos utca 15, Budapest VI.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aligantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro,

Béziers (Hérault), Francujo,
3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Korespondantoj, atent!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto, la deziron posedi fotografon de sia korespondanto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ tro multkostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi liveri por la interŝanĝo tre malmultkostajn belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 55 germ mk. Ĉiu plia linio da teksto kosta 2 mk. pli; por sendoksto aldonu koncernan sumeton. Formato 96 x 45 mm. Farota laŭ ĉiujn kondiĉojn, kio estas resendata sendifekte. Livrettempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUKTA

Printempa Foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto
Aŭtuna Foiro 1922 de la 27-a de aŭgusto ĝis 2-a de septembro

La centra merkato por la internacia komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj
Informoj donas kaj aligojn akceptas
MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG
(Foiroŝtacio por la Specimenfoiroj en Leipzig)

Poŝtmarkoj ĉiulandaj

(transoceanaj, koloniaj, novaĵoj) kaj ĉiaj filatelistaj bezonaĵoj (albumoj, katalogoj, ktp.) estas liverataj je malaltaj prezoj laŭ katalogo Ivert Teller de

E. Gabelmann, komercisto, Freiburg i. Br.
Katharinenstr. 14 (Germ.)

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové, Otto Lumpe, Trautenau.
Estona: Est. Esp. Unuĝo, Postkasti 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Orono, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-11-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Grandkomerco de Maŝinoj

Freiburg i. Br. Germanio
Kirchstr. 24
posedanto: J. Hug.
Importo. Eksporto.

Aŭtomobiloj :: Motorveturiloj
Bicikloj
Kudromaŝinoj :: Skribmaŝinoj
Anstataŭaĵoj kaj Alaĵoj.
Eksporto al ĉiuj landoj je fabrik-prezoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Babcock-Wilcox

Akvotubo-Kaldronoj

por normala kaj tre alta vaporigo estas fabrikataj de

FRATOJ STORK & K-io

HENGELO (O) NEDERLANDO

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.
Esperanto korespondanta.
Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Eilersiek --- Wissmann-str. 46
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiujmonata organo por perfektigo en Esperanto.
Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkuponon aŭ 2 Mk. germ.
Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

Antaŭ nelonge aperis en la eldonejo de Wilhelm Violet, Verlagsbuchhandlung, Stuttgart:

Esperanto.

La Gramatiko de D-ro Zamenhof kun komentario de Prof. P. Christaller.
96 paĝoj. Prezo bindite gmk. 11.40.

Ne lernolibro por komencantoj, sed enciklopedio por ĉiuj dezirantaj perfekte elerni la lingvon. Samtempe bonega ekzerclibro pro la apuda Esperanta traduko.
En tri monatoj 1500 ekzempleroj vendita!

Libra kaj Arta Presejo

Emil Friedr. Adolph

Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 58

Fabrikado de bonkvalitaj artpresaj prospektoj kaj de ĉiaj presaĵoj por komerco kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.
Korespondado: Esperanto, Angla, Franca, Germano ktp.

Per Esperanto

la estro de la fako komerca kaj industria ĉe la urba oficejo de Tokio deziras aranĝi

Ekspozicion de ĉiuspecaj komerc-reklamaĵoj.

Konsiderante, ke tio povas havi bonan propagandan efektan por Esperanto en nia lando kaj ankaŭ en tutmondaj komercaj rondo, mi petas sendi al mia adreso (Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio) aŭ rekte al s-o S. Kaŭŝima, fakesiro de komerco kaj industrio ĉe la urboficejo Tokio, ĉiuspecajn pendreklamajojn, murafisojn ktp. diverslandajn en iliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Celo de la ekspozicio estas instigi la ĉi-tiajn komercistojn al la plej progresinta moderna reklam-maniero. Al sendintoj la fako komerca kaj industria rekompence sendos japanajn komercajn pend-afisojn.

M. Ga, Tokio (Jap.)
Del. de UEA.

Pilgrandigaj Aparatoj

Poŝtmarko - Kameroj

Poŝtografiloj 6x9

Maŝinoj por oblika traŝado en solida kvalito estas fabrikataj de

P. Tzschachmann, Freiburg i. Br. (Germ.)

Fabrikejo de fotografaj aparatoj
Katharinenstr. 15. Katharinenstr. 15
Eksporto al ĉiuj landoj. — Reprezentantoj serĉataj.
Prospektoj kun prezoj laŭ deziro.

Anoncoj.

DANKO. La redakcio kaj administracio de ET kore dankas al ĉiuj gratulintoj pro la Nova Jaro kaj deziras same ĉion bonan.

ESP. EKSPONICIO. Por interesi geurbanojn, lomete ne konfidantaj al nia lingvo, ni aranĝas Esp. ekspozicion dum majo 1922. Redakcio, grupoj kaj apartaj Esperantistoj estas afable petataj sendi diversajn gazetojn, propagandilojn, ilustr. poŝtkartojn ktp. al adreso: Vladimir Georgiev Chavgov, str. Skobeleva 58, Rusĉuk, Bulgario.

PROPONO. Malriĉa samideano (grupfondinto kaj grupestro) petas bonkorajn finnajn samideanojn por senkosta gastigo dum la XIV-a kongreso. Rekompence mi gastigos finnon samlongan tempon en Salzburg. — Oni sendu bonvolajn proponojn al Ferd. Peter Huber, Salzburg, Aŭstrio, Münchberg 5.

EDUKISTO. Juna germana instruisto, 22-jara, deziras okupadon kiel domininstruisto ĉe eksterlanda germana familio. Adreso: Hermann Petermann, Hagen i. W., Germ., Fleyerstr. 57.

TIPOGRAFISTOJ. Afable sendu ĉiuspecajn efikajn presojn ĉiulingvajn taŭgajn por esti presataj kiel modeloj en fakjurnalo ilustrita, aperonta kiel poresperanta propagandnumero. Dankonite: A. von de Held, Leipzig-R., Charlottenstr. 11, III., Germ.

JUNULOJ. Aligu al manuskripta rondiranta informo „Junula Revuo“. Subtenu ĝin per kunlaboro. Postulu informojn kontraŭ respond-kuponon. Adreso al Henriko Seppik, Manesi 7-12, Tallinn, Estonio.

JUNA SVISA KOMERCISTO serĉas okupadon en Berlin por lerni germanan lingvon. Li aĉipovas librotendon, francan, alian kaj Esperantan lingvojn. Unuaklasaj referencoj. Li ŝatas eniri ĉe eksportfirmo aŭ fabriko. Ofertojn sub „Berlin“ peras la administracio de ET.

BERLIN. Juna komercisto serĉas en centro de Berlin bongegan pensilon (belan ĉambro, matenmanĝon, meztagmanĝon, banon). Ofertojn sub „Pensilono“ peras la administracio de ET.

FILATELISTA CENTRALO. Ni aĉetas ĉiuspecajn poŝtmarkojn, ĉu 10-50-100 serioj, ĉu folioj, ĉu 1000-10000 ordineraĵoj poŝtmarkoj. Serĉas ankaŭ malnovajn leterojn, tutajn kolektojn ktp. Nur ne tro altaj proponoj estas konsiderataj. La samideanoj bone aĉetas ĉe ni kaj estas kontentaj. — Gefratoj Fischer, Nürnberg, Fünferplatz 6, III., Germ.

GRAVA POR FILATELISTOJ. Poŝtmarkoj 10 rubl. rusaj, eldonitaj dum 1906, nestampitaj; prezo 55 gmk., 2 sviz. fk. aŭ 5 fr. fk. po peco; ĉe aĉeto de 50 pecoj rabato de 15%. La monon sendu en rekomendita letero al J. Gawronski, skr. pozt. 22, Bydgoszcz, Pol.

KIU VOLAS ricevi versajojn de Belmont, sendu al mi unu ekzempleron de la Esperanta gazeto; kiu volas ricevi mian Krestomation, sendu tri gazetojn. Ruslando, Moskvo, ĉudovskoj per. N.6, Komitato de Esperantistoj Svjaz, al M. S. Valentinov.

POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Świat Pracy“, organon de Asocio de Laboristaj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevebla ĉe Księgarnia Rebeñiczka, Warszawa, Wapolna 17.

ET n-ojn 8, 10, 11, 12, 13, 14, 17 kaj 21 deziras aĉeti s-o A. Ferrer, Asturias 44, i. Barcelona, Hisp.

ET n-ojn 1-8 kaj 13 deziras aĉeti s-ano Antonio Jucá, str. Santa Isabel 50, Fortaleza-Ceara, Brazilio.

JUNILARO. La redakcio de la Esp. gazeto „Junularo“ deziras ricevi Esperantajn manuskriptojn (mallongajn rakontojn, arikolojn, poemojn). Rekompence oni sendos la gazeton dum unu jaro. Adreso: „Junularo“. Privoz, Ĉeĥoslovakio.

MEZA LITOVIO. S-o W. Kwieciński, Wilno, Meza Litovio, ul. Zelazna Chaika d. Kielbonskio, vendas nestampitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio: 20 specoj nur 15 germ. mk., forsenditaj en rekomendita letero.

ELDONISTOJ. Kiu volas entrepreni presigadon de libro, malgranda formato, ĉirkaŭ 30 paĝa, kun ilustraĵoj, bonvolu afable skribi, notante samtempe la kondiĉojn, al Adolfo Oberrotman, Warszawa, Pol., Krak-Przedm. 10.

ESP. EKSPONICIO. Fritz Michalek, Relchenberg, Lerchenfeldstr. 20, Ĉeĥoslovakio, kolektas kaj interŝanĝas por konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantojn, propagandilojn ktp.

„OVIDLIBRO DE GIRONA“. — Mendu ĝin ĉe la grupo „Gerona Espero“, Urbomdo (Cases Consistoriales), Girona, Hisp. — Belegaj gravuraĵoj kaj detala arkeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Prezo unu peseto aŭ alia egalvalora monsumo.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Martin Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtkarto-n ilustr. (bfi), poŝtmarkojn kaj ilustr. jurnalojn en ĉiu lingvo kun ĉiuj landoj.

S-o L. Jürisson, instruisto, Haapsalu, Saksa 6, Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn de Eŭropo.

S-o A. Kollamaa, Haapsalu, Kalda 31, Estonio, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Estonio, Haapsalu, radiojoam, John Vunk, telegrafisto de senfadena telegrafo, korespondas kaj interŝanĝas kun ĉiuj landoj ilustr. poŝtkartojn kun vidaĵoj de urboj, pri elektrotekniko kaj vojaĝo.

Haapsalu, Estonio, s-o J. Rand, Kalda 31, deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj.

Ludwig Wagner, ŝtatoficisto, München (Bavario, Germ.) Isabellastr. 40, Vorderhaus, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., leteroj, kaj interŝanĝi gazetojn, poŝt kaj sigelmorkojn ktp.

Mi deziras korespondi kun Anglujo, Ameriko, Skandinavio kaj Japanujo. — Kiu interŝanĝas kun mi fotografajojn? Mi povas sendi bonejn sportofotojn, ankaŭ el filmoj. Otto Weselmann, Nordstr. 77-II, Düsseldorf, Germ.

Max Spahn, Düsseldorf, Collenbachstr. 75, Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj (bfi.)

Max Knittel, bankoficisto, Oels i. Schl., Germ., Bankhaus Bielschowsky, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. Mi interŝanĝas poŝtmarkojn kaj help-papemonon.

Karl Niebach, Oels i. Schl., Kronprinzenstr. 2, Germ., deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj; interŝanĝas poŝtmarkojn kaj help-papemonon.

F-ino Erika Neuroth kaj s-o Richard Neuroth, 19-Jara, Fürstenstr. 6-III, Breslau 9, Germ., deziras korespondi per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj (bfi.) kun la tuta mondo.

S-o W. Ekert, Wilhelmshaven, Moltkestr. 5, Germ., deziras korespondi poŝtkarte kaj letere kun ĉiuj landoj.

S-o Georg Garbe, Bremen, Riensbergerstr. 12, Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiuj landoj.

S-o Lorenz Brendel, Wiesdorf apud Köln, Wöhlerstr. 19, I. (Germ.), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfi.) kun la tuta mondo.

S-o H. Singer, München, Sedanstr. 10, II., Germ., deziras daŭran korespondadon kun eksterlandaj fraŭlinoj pri ĉiu temo per belaj poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Böning, Libanonstr. 45, Stuttgart, Germ., sendas poŝtkartojn laŭdeziro, poŝtmarkojn, Esp. literaturajn verkojn, Esp. sigelmorkojn, -kartojn kontraŭ poŝtmarkoj uzitaj aŭ neuzitaj kaj Esp. literaturaj, per ne-enskribitaj leteroj.

William Böttger, poŝta supersekretario, Werdau, Saks., Germ., deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj leterojn, precipe kun kolegoj. Mi ankaŭ provizas provizorojn je memvaloro, prezonte kelkajn poŝtmarkojn al mi.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Dobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn gekorespondulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfi.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn.

Karl Berthold, Schwanenbergr. 71, Stuttgart, Württemberg, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn, precipe maloftajn kaj altvalorajn, sed nur kun tute seriozaj kolektantoj kaj ankaŭ nur per ne-rekomenditaj leteroj (sendas laŭdeziro unue.)

S-ino Emma Broisdorf, Wiesdorf apud Köln, Lichstr. 21, (Germ.), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfi.) kun la tuta mondo,

Hans Kubiak, Breslau 5, Gräbschenerstr. 82, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Hermann Schmidt, Unteraltendurg 10, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj.

Oswald Wittig, Klausentor 3, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj pri interesaj temoj.

Alfred Müller, juna instruisto, Halleschestr. 117, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri seriozaj temoj (filozofio, psikologio, budhismo ktp.).

Heinz Ewers, Reglerung, Abt. Sch. P., Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, per poŝtkartoj, poŝtmarkojn kaj leteroj.

Franz Lischke, Roter Feldweg 4, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj, precipe kun instruistoj, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Erich Haferkorn, Halleschestr. 117, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

F-ino Marie Schmidt, Unteraltendurg 10, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

W. Gutmann, Landhausstr. 55 B, Stuttgart, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn nur kun seriozaj kolektantoj per ordinaraĵ leteroj.

Walter Geppert, Breslau II, Germ., Buddestr. 15, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfi.) kun samideanoj en ĉiuj landoj.

55 fervore lernantaj geknaboj (11-15 j.) serĉas samajn gekorespondulojn. Ilustr. poŝtkartoj al Instr. Friebe, popola lernejo Dresden-Dobritz, Germanlando.

Leonhard Grassmann, Billrothstr. 41, I, Wien 19, Aŭstrio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfi.) kun la tuta mondo.

F-ino Aranka Micey, Budapest, Grof Zichy Jenő u. 45-1-6, Hungario, korespondas kun ĉiulandanoj per ilustr. poŝtkartoj (pm. bildflanke).

Haapsalu, Estonio, J. Grünthal, pk. 15, deziras korespondi letere kun spertaj gvidantoj de esperantaj kursoj pri pli intensa kaj interesa instrumantaro.

S-o Jung Janos, Telekhez g. 5, Temesvar II, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo kaj ilustr. poŝtkartojn.

S-o Kotka Stefan, Kisjenő, via Arad, Rumanio, interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Oskari Ruohio, Finnlando, Viborgo, K. Erik. L. puistok 11, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

S-o Yrgö Ruohio, Finnlando, Viborgo, Waasan. 25, „Hankkija“, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Jako Caballé, 21-jara Esperantisto, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj (bfi.) aŭ leteroj, precipe kun gelaboremaj. Adreso: S-ta Galileo 54, Tarrasa, Hisp.

S-o Edy Kotora, Doubravka 220, Ĉeĥoslovakio, elektroteknikisto, deziras korespondi kun amikoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn kaj poŝtkartojn ilustr.

21-jara muzikisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bfi.) kaj leteroj; interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn kaj help-papemonon. — S-o Günther Jakob, Trebnitz i. Schl., Germ., Breitestr. 12.

S-o Sviatunov, studento de politeknika instituto, interŝanĝas poŝtkartojn leterojn kun samideanoj de ĉiuj landoj. Ruslando, Saratov, ul. Respublika 40, Esperanta Biblioteko.

Aleksandro Galunov, Petrograd, Rusio, Poĉtamskaja 16-18, loĝ. 17, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr.

S-o Eugeniusz Lubowiecki, Lodz, Pol., ul. Zamenhofska 34, deziras interŝanĝi leterojn kaj ilustr. poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-ino Walentyna Nikolajczykowska, Lodz (Pol.), Radwanaka 51, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, prefere popolajn tipojn.

S-o Minč, studento de natursciencia fakultato, interŝanĝi poŝtkartojn, leterojn kun samideanoj de ĉiuj landoj. Korespondas pri stenografio, ŝakludo, pri naturscienco, pri Ruslando ktp. Adreso: Pollando, Sienna 72 m. 28, Warszawa.

S-o M. Fieurski, Bydgoszcz, Pol., ul. Grodzka 2, deziras interŝanĝi ĉiuspecajn poŝtkartojn ilustr. kun la tuta mondo.

S-o Mieczyslaw Borucki, Bydgoszcz, Pol., str. Emilia Warminkiego 13, interŝanĝas poŝtkartojn, poŝtkartojn ilustr., gazetojn, leterojn kaj papemonon.

S-o Br. Kruszczyński, Bydgoszcz, Pol., ul. Siemiradzkiego 10, interŝanĝas poŝtmarkojn kun seriozaj progresintaj filatelistoj.

Mi sendas por 20 gmk. aŭ 40 malsamaj nedifektitaj poŝtmarkoj 36 poŝtmarkojn de Meza Litovio. — H. Horodnic, Wilno, Sw. Anny 7-7.